

Bulgaria ESPERANTISTO



ENHAVO

* * *	La 30-jara jubileo de nia libero	1
	Nenka Jonkov. La partopreno de la bulgaraj esperantistoj en la kontraŭfaŝisma batalo	3
	Ŝterjo Kukuŝev. Teofil Daŝinov	6
	Asen Grigorov. Gardu la pacon	7
	Prodan Prodanov. Alarmo	7
	Ana Kukuŝeva. Esperantista renkontiĝo en Peŝtera	11
	Rajna Stanĉeva. Promeso de Esperanta aktivulo	12
* * *	La rezultoj de la Jubilea Literatura Konkurso	13
* * *	59-a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo	14
	Marin Băcev. Stelenigmo	IV

Sur la kovrilpaĝo:

En grandiozaj naŭseptembraj manifestacioj la popolamasoj esprimas entuziasme senliman amon kaj fidelecon al sia registaro kaj la Bulgara Komunista Partio — saĝa gvidanto al komunismo, al tutpopola feliĉo

Abonkotizo: jara—1,40 levoj. Por eksterlando—3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por sm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Carducci
32, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pieng' jang
P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23
Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, P. O. Box 205,
București 1.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika,
D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Moskva
V—449.

SVEDIO: Karl Krist, Deje, Box 109.

**LA 30-JARA JUBILEO DE NIA LIBERO**

Tago unua de nova Bulgario estas la Naŭa de Septembro 1944. En la mateno de tiu ĉi tago nia laborpopolo, gvidata de la Bulgara Komunista Partio, unuiĝinta sub la standardo de la Patrolanda Fronto kaj decide helpata de la glora Ruĝa Armeo de USSR, leviĝis kiel unu homo kontraŭ la monarkofaŝisma tiraneco, forbalais ĝin por ĉiam kaj establis sian demokratian regadon. Kroniĝis per majesta venko la multjara peza batalo de la bulgaraj laborista klaso, laborvilaganaro kaj popola intelektularo. La Naŭa de Septembro 1944 fariĝis la plej granda evento en la 13-miljara historio de Bulgario. Ĝi estis radikala turniĝo el la mondo de socia maljusto kaj ekspluatado al libera kaj ĝoja mondo — la mondo de la socialismo.

Malriĉa, postrestinta agrikultura lando estis malnova Bulgario, lando de lignoplugilo kaj fosilo. La milito ankoraŭ pli ruinigis ĝian ekonomion. Tamen sub la saĝa gvido de la Bulgara Komunista Partio, dank' al la grandega kaj malprofitema helpo de Sovetunio kaj la plej intima kunlaborado kun la ceteraj frataj socialismaj landoj Bulgario ne nur ekstaris surpiede, sed ankaŭ certe ekmarŝis antaŭen, al la suproj de la socialismo kaj komunismo. Dum mallonga periodo efektiviĝis la profetaj vortoj de la granda filo de nia popolo Georgi Dimitrov, diritaj en la V kongreso de BKP en 1948: „Estas necese, ke Bulgario atingu dum 15—20 jaroj tiom, kiom aliaj landoj ĉe aliaj cirkonstancoj atingis por tuta jarcento.“

Hodiaŭ Bulgario estas moderna, industri-agrkultura lando, aŭtoritata faktoro de paco kaj internacia kunlaborado ne nur sur la Balkanoj, sed ankaŭ en Eŭropo kaj la tuta mondo.

Sur la kampo de la ekonomio unu el la plej grandaj akiraĵoj de nia socialisma revolucio estas la konstruo de propra industrio. Tiurilate la ĉefa atento estis koncentrita al la evoluigo de tiuj industriaj branĉoj, kiuj produktas rimedojn por produktado: maŝinkonstruado, energetiko, kemio, metalurgio. Pri ilia disvolviĝo tre elokvente parolas la komparoj kun la situacio en 1939 — la lasta pactempa jaro de kapitalisma Bulgario.

La maŝinkonstruado okupis unu el la unuaj lokoj en nia ekonomio. Kompare kun 1939 j. ĝia produktado kreskis 605-foje (40% de nia eksporto).

Kun konsternaj ritmoj disvolviĝis la energetiko. Nun dum malpli ol semajno Bulgario produktas tiom da elektroenergio, kiom ĝi produktis dum la tuta 1939 j.

La kemia kaj kaŭĉuka industrioj obligis sian produktadon 275-foje kompare kun 1939. Hodiaŭ ili nur dum du tagoj donas la tutan produktadon de 1939. Laŭ produktado de azotsterkoj nia lando okupas la 12-an lokon en la mondo. La produktaĵoj de la kemi-farmacia industrio, la antibiotikoj kaj vico da aliaj medikamentoj ĝuas vastan rekonon en la internacia merkato.

Unu el la bazaj pilastroj de la material-teknika fundamento de la socialismo en Bulgario estas la metalurgio. Kompare kun 1939 nia nigra metalurgio hodiaŭ donas 591-foje pli multe da produktaĵo.

La forpasintaj 30 jaroj estis jaroj de radikala rekonstruo de nia vilaĝmastrumo sur socialismaj reloj. Ĉe ni estis tre sukcese aplikita la kooperativa plano de V. I. Lenin. La bulgara vilaĝmastrumo fariĝis moderna, alte mekanigita, kun akiroj nekonataj ĝis nun en nia lando. Kompare kun 1939 j. ĝia komuna produktaĵo kreskis 2,3-foje.

Unu el la plej konvinkaj indicoj pri la ekonomia kresko kaj pri la altigo de la materiala bonstato de iu popolo estas la nacia enspezo. Laŭ ritmoj de kreskado de la nacia enspezo hodiaŭ socialisma Bulgario okupas unu el la unuaj lokoj en la mondo. Kompare kun 1939 j. nia nacia enspezo kreskis 7-foje.

Grandaj estas la sukcesoj de nia Respubliko sur la kampo de sociaj zorgoj, sanprotektado, instruado, kulturo, arto ktp. „Ĉio en la nomo de la homo, ĉio por la bono de la homo“ — tio estas la ĉefa zorgo de la Bulgara Komunista Partio kaj de la popola ŝtato.

Antaŭ ĉ. 40 jaroj Bulgario okupis unu el la unuaj lokoj en Eŭropo laŭ mortonombro de la loĝantaro. Ekz. en 1929 el inter 1000 personoj mortis 18, en 1939—13,4, kaj en 1972—9,8 personoj. En la periodo 1935—1939 la meza daŭro de la homa vivo ĉe ni estis 52 jaroj, en 1971 ĝi kreskis al 71 jaroj.

En Bulgario la socialismo fariĝis ora jarcento por disvolviĝo de la ekonomio kaj la kulturo, por plialtigo de la popola bonstato. Evidentiĝis por ĉiuj, ke nur la socialismo povas forigi la malbonojn kaj la maljustojn de la kapitalisma sociordo, nur la socialismo povas realigi la revojn de la popoloj pri feliĉa kaj digna homa vivo por ĉiuj.

Sed plej granda atingiĝo de la socialisma revolucio en nia lando estas la nova homo, homo mastro de sia patrolando, konscia konstruanto de sia nova, feliĉa vivo. Ĉe ni la vorto „homo“ vere sonas fiere!

Ĉio, kion la bulgaraj laboruloj atingis dum la pasintaj 30 jaroj, estas ligita kun la nomo de la Bulgara Komunista Partio — kuraĝa organizanto de ĉiuj niaj venkoj, saĝa kaj elprovita gvidanto de nia popolo survoje al komunismo, al tutpopola bonstato kaj feliĉo.

La ĉefa movanta forto de nia impeta iro antaŭen, sur la vojo de socialismo, estas la bulgara-soveta amikeco. Ĝi estas amikeco frata, vivokrea. En ĝi unuritime pulsas du sinamantaj koroj — la koro de la granda Lando de la Sovetoj kaj la koro de Bulgario — ĝia malgranda laŭ dimensioj, sed granda laŭ fideleco fratino!

Ni, la bulgaraj esperantistoj, donis nian kontribuon en la batalo por socialisma Bulgario. Ni donas ĝin ankaŭ nun — en la konstruado de nova vivo en nia patrolando. Ni estas fidelaj al la granda afero de la Naŭa de Septembro kaj ni fordonas ĉiujn niajn fortojn kaj kapablojn por ĝia plua triumfo. Sed esti fidelaj al la afero de la Naŭa de Septembro por ni, la bulgaraj esperantistoj, signifas ankoraŭ: per ĉiuj rimedoj kaj formoj popularigi la sukcesojn kaj la ĉiuf flankan floradon de socialisma Bulgario, montri ilin kiel nerifuteblan argumenton pri la avantaĝoj de la socialismo antaŭ la kapitalismo. La ekzemplo de Bulgario estas imitinda. Ĝi manifestas, kiel unu malgranda lando, ekirinta laŭ la vojo de la socialismo, povas konkuri malnovajn evoluintajn landojn kaj paŝi en la fruntaj kolonoj de la batalo por paco kaj socialismo, por progreso de la tuta homaro.



Heroa pasinteco

LA PARTOPRENO DE LA BULGARAJ
ESPERANTISTOJ EN
LA KONTRAŬFAŜISMA BATALO

La demando pri la partopreno de la bulgaraj esperantistoj en la kontraŭfaŝisma batalo ankoraŭ ne estas tutece esplorita en nia scienca literaturo. En ĉi tiu artikolo ni nur koncize lumigas ĝin.

La Bulgara Esperantista Asocio estas fondita je la 5 de aŭgusto 1907. Esperantistoj en nia lando tamen aperis tre frue — tuj post la aperigo de la unua E-lernolibro en 1887. Ili ekagis idealisme — disvastigadis la lingvon, fondis E-grupojn, eldonis gazetojn kaj ĵurnalojn.

Komence la esperantistoj en nia lando estis precipe intelektuloj, la pli granda parto de kiuj estis adeptoj de neŭtraleco de la Movado.

La fino de la Unua Mondmilito kaj la komenciginta tuj poste revolucia krizo skuis ankaŭ la esperantistojn. Kelkaj el ili forlasis la poziciojn de la neŭtralismo kaj ekstaris sur la pozicioj de la laborista klaso. En 1920 j. Panajot Kolev, Angel Georgiev, Meleŝko Ŝiŝkov k. a. fondis organizajon „Balkana Liberiga Stelo“, kiu havis la celon propagandi Esperanton inter la laboristoj, labori por kompreniĝo inter la balkanaj landoj kaj kontraŭstari la politikajn planojn de la balkanlandaj kapitalismaj registaroj. „Balkana Liberiga Stelo“ havis certajn sukcesojn kaj iniciatis la alligon de Esperanto kun la laborista movado.

La ofensivo de la faŝismo en 1923 j. trafis ankaŭ la progresemajn esperanti-

stojn en nia lando. Ili estis submetitaj je reprezalioj kaj mallibereco. Ĉesis ekzisti „Balkana Liberiga Stelo“.

En la malliberejo la progresemaĵoj esperantistoj komencis varbi junulojn, laboristojn k. a. por Esperanto. En artikolo sub titolo „Esperanto en la malliberejo“ („Balkana Laboristo“, n-ro 5—6) la nuna membro de Politburoo de CK de Bulgara Komunista Partio kaj honora prezidanto de Bulgara Akademio de Sciencoj akademiano Todor Pavlov skribis: „Dum la vintro de 1926/1927 tuta grupo de junuloj, laboristoj, lernantoj kaj studentoj havigis al si unu-du lernolibrojn kaj komencis studi fervore la lingvon. Per sia junula entuziasmo ili priagitis ankaŭ min. . .“ Skribante pri la praktika aplikado de Esperanto en la kontraŭfaŝisma batalo dum tiu periodo akad. Pavlov substrekis plue: „Kamaradoj esperantistoj, turnu vian rigardon ankaŭ al la malliberejoj. . . La fundamenta, la ĉefa, kiun la malliberuloj postulas de vi kaj de ĉiu laboristo en nia lando kaj en eksterlando, estas la batalo, la sistema, obstina kaj senĉesa batalo por plej eble baldaŭ plena kaj senkondiĉa amnestio. . . Guste por la celoj de tiu batalo la laboristoj-esperantistoj devas enporti en la malliberejojn ankaŭ Esperanton; sendante protestojn en Esperanto eksterlanden kaj montrante en la tutmonda Esperanto-literaturo la teruron de niaj malliberejoj kaj la senprecedence bravan

sintenon de niaj politikaj malliberuloj ili vekos la intereson de proksimuloj kaj kamaradoj. Esperanto devas eniri la malliberejojn kiel potenca rimedo en la batalo por liberigo. Tio estas ankoraŭ unu argumento por ĝi kaj eble unu el la plej konvinkaj argumentoj. . . “

Restabiliginte post la battoj de la faŝismo en 1923 kaj 1925 la progresemaj esperantistoj komencis organizi sin en laboristaj E-societoj. Ĉirkaŭ la mezo de 1929 j. tiaj societoj fondiĝis en Plovdiv, Sofio, Stara Zagora, Varna, Vraca, Asenovgrad k. a. En junio 1930 unuigante la laboristajn E-societojn oni fondis Laboristan Esperanto-Asociacion (LEA) kiel sektion de l' Internacio de Proletaj Esperantistoj (IPE), aganta sub la idea influo de la tutmonda komunista movado.

LEA jam de sia komenco estis klasbatala organizaĵo, aganta sub la idea gvido de la Bulgara Komunista Partio. En n-ro 3, jaro 3 de „Balkana Laboristo“ oni skribas: „Ni ne forgesu, ke antaŭ ĉio ni estas klasa kontraŭfaŝisma proleta organizaĵo. . . “ Samtempe la agantoj de LEA klare komprenis, ke ili estas nur eta mekanismo en tiu ĉi klasbatalo kaj tute ne emis troigisian kontribuon en ĝi. En artikolo „Ni ne supertaksu Esperanton“ (n-ro 8, febr. 1932) de ĵurnalo „Mejdunaroden Ezik“ (Internacia Lingvo) tiu ĉi demando, estas korekte prilumita: „Oni ne pensu ke la internacia laborista Esperantomovado povas ĝenerale anstataŭigi la internacian laboristan movadon. Oni devas klare kompreni, ke ni estas nur parteto de ĝi kaj ni devas uzi niajn realajn fortojn por ĉiuflanke priservi ĝin per Esperanto.“

La periodo 1930—1934 karakteriziĝas per organiza firmigo de LEA. Ĉe sia Dua Konferenco la Asocio nombris 250—300 membrojn, kaj en la rezolucio de la Tria Konferenco, kiu okazis la 25-an de februaro 1934, oni konstatas, ke la societoj de LEA jam estas

35—40 kun pli ol 500 membroj. Al la Asocio estis altirita granda nombro da laboristoj, precipe industriaj, en Plovdiv, Pernik, Sofio, Kurilo, Asenovgrad, Varna k. a.

En la sama rezolucio kiel pozitivam en la agado de LEA oni konsideras la fakton, ke fortikiĝis la rilatoj de l'Asocio kaj ĝiaj sekcioj kun la ceteraj klasaj laboristaj organizaĵoj ĉe ni, pliboniĝas ilia partopreno en la komunaj klasbataloj, en la laborista gazetaro, en kolektado de sumoj por la fondusoj „Klasbatalo“, „Viktimoj de la Blanka Teroro“, „Strikbataloj“, „Laborista Gazetaro“ k. a.

Dum la menciita periodo la progresemaj bulgaraj esperantistoj disvolvis vigan agadon ankaŭ per siaj periodaĵoj.

Ekde 1929 komencis aperadi revuo „Balkana Laboristo“, kiu poste farigis organo de LEA. En ĝi estis artikoloj kontraŭ faŝismo, pri Esperanto kaj la laborista klaso, pri la Unua de Majo k. a. Ĉi tie oni trovas versaĵojn de Botev, Smirnenski, N. Lankov k. a. tradukitajn en Esperanton, rakontojn kaj fragmentojn el la verkaro de Georgi Karaslavov kaj aliaj progresemaj aŭtoroj.

En oktobro 1931 aperis ĵ. „Mejdunaroden Ezik“ (Internacia Lingvo) — bulgarlingva eldonaĵo de LEA, kiu ankaŭ spegulis la agadon de la progresema E-movado en nia lando, batalis kontraŭ la faŝismo kaj propagandis la atingaĵojn de Sovetunio.

Sed la plej potenca batalilo en la manoj de LEA estis la dusemajna ĵurnalo „Mejdunaroden Labselkor“ (Internacia Laborista-Kampanara Korespondanto), kies unua numero aperis je la 10 de novembro 1932. Ĝia devizo estis: „Proletoj el ĉiuj landoj, unuigu vin!“ Kune kun la cetera laborista gazetaro „Mejdunaroden Labselkor“ estas unu el la eldonaĵoj, kiu multe kontribuis por la unuecigo de la laborista klaso en la batalo kontraŭ la kapitalismo kaj fa-



ŝismo. La eldonkvanto de tiu ĉi ĵurnalo atingis 6000—7000. Ĝi estis bulgarlingva, laŭ materialoj ricevitaj pere de Esperanto, kaj disvastĝis precipe inter laboristoj, vilaĝanoj kaj laborista intelektularo.

„Mejdunaroden Rabselkor“ energie batalis kontraŭ la arbitroj de la faŝismo en nia lando. En ĉiu numero estis protestoj kontraŭ arestoj de progresemaj esperantistoj kaj neesperantistoj. Ekzemple la ĵurnalo en ĉefartikolo rilate la leĝprojekton kontarŭ la laborista gazetaro (n-ro 1/1932) protestis kontraŭ la ek-sigo de 48 studentoj el la Universitato kaj ties puna alilogo (n-ro 22/1932), kontraŭ la aresto de la gvidantoj de LEA N. Aleksiev kaj G. Uzunov (n-ro 1/1932), kontraŭ la inkviziciado de la proleta esperantisto M. Conkovski el Sofio en la policejo (n-ro 13/1933) k. a. En n-ro 20 de la 6. XI. 1933 estis publikita protesta telegramo de CK de LEA al la germana registaro lige kun la Leipzig-proceso, en kiu oni diras: „CK de LEA protestas plej energie kontarŭ la persekutoj al la komitato por defendo de Dimitrov-Torgler; ĝi protestas kontraŭ la monstra proceso en Leipzig kaj insistas, ke oni ĉesigu la proceson kaj senprokraste liberigu Dimitrov, Popov, Tanev, Torgler kaj ĉiujn viktimojn, kiuj troviĝas en koncentrejoj.“

Grandega estas la kontribuo de „Mejdunaroden Rabselkor“ por la propagando de la atingajoj de Sovetunio, por konatigo de la bulgaraj laboruloj kun la vivo de la unua proleta ŝtato. En ĉiu numero de la ĵurnalo estis almenaŭ du materialoj kun informoj pri la vivo en USSR. Tio estis leteroj, kiujn progresemaj bulgaraj esperantistoj ricevis de siaj sovetaĵ korespondamikoj. Jen la titoloj de kelkaj similaj materialoj: „La socialisma konstruado en Sovetunio — Dneproges“, „Kiel vivas la ruĝarmeanoj“ (kun subtitolo: „Respondo al la dikaj mensogoj de ĵ. „Dnevnik“*), „16-jarojn da soveta regado“, „La Ruĝa Armeo estas nevenkebla“, „La

virino en USSR“, „La soveta nupto“ k. a. „Mejdunaroden Rabselkor“ konigis al siaj legantoj ankaŭ la batalojn de la laboruloj en la kapitalismaj landoj — Germanio, Francio, Japanio, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, la balkanaj landoj k. a.

Grandan meriton havas „Mejdunaroden Rabselkor“ por senmaskigo de la bulgaraj reakciaj regantoj, de la kapitalisma sociordo en nia lando. En n-ro 24 ĝi instigas siajn legantojn montri en siaj korespondajoj kun eksterlando faktojn pri „la terura senlaboreco kaj nifero de la laborpopolo ĉe ni, pri la amasaj eksigoj el oficejoj, laborejoj kaj fabrikoj, pri la organizado kaj la bataloj de la laboristoj kaj la kamparan-amasoj kontraŭ la senlaboreco malsato kaj pezaj impostoj“.

Ofte la esperantistoj havigis pere de Esperanto materialojn el eksterlando al la bulgarlingvaj ĵurnaloj.

Post la militist-faŝista puĉo de la 19 de majo 1934 LEA estis devigita fariĝi eksterleĝa. Ĝia presbazo estis likvidita. En Plovdiv kaj Varna funkcioj de LEA estis kondamnitaj je multjara mallibereco. La progresemaj esperantistoj eniris en la societojn de Bulgara Esperantista Asocio kaj tie komencis aktive labori por serioze puŝi ĝian disvolviĝon en progresema direkto.

En la dua duono de la 30-aj jaroj la Komunista Partio jam havis tre fortan influon super la tuta bulgara E-movado. La progresemaj esperantistoj estis la plej agemaj, la plej sindonaj membroj de la E-societoj, ili jam komencis doni tonon en ilia ĉiufanka laboro. Ne hazarde en la policaj dosieroj de la partiagantoj oni kolektis ankaŭ materialojn en Esperanto, kaj la scio de Esperanto estis konsiderata kiel signo de progresemo.

En la jaroj de armila batalo kontraŭ la faŝismo (1941—1944) en la bulgara rezista movado partoprenis ankaŭ plu-

* „Dnevnik“ — burĝa ĉiutaga ĵurnalo en Bulgario, multjare aperinta.

raj esperantistoj. La ĉefa en ilia agado estis la aparteno al la klaso, al la Komunista Partio — kaj al tio ili subigis sian tutan vivon. Sed samtempe ili arde amis Esperanton kaj laboris entuziasme kiel esperantistoj. En CK de BEA estas nomaro de ĉ. 116 esperantistoj pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo. Inter ili estas la nomoj de la elstaraj agintoj de Bulgara Komunista Partio, Laborista Junulara Unuiĝo, Patrolanda Fronto kiel: Nikola Šopov — sekretario de LEA, Stojan Edrev, Dičo Petrov, Hristo Kărpaĉev, Dimitr Kaljaŝki, Vela Peeva, Hristo Kozlev, d-ro Vărban Genĉev, d-ro Stojan Vasilev, la poeto Cvetan Spasov k. a. En sia nelegala agado multaj partoprenantoj en la kontraŭfaŝisma batalo uzis Esperanton kiel kontaktilon inter si. En la malliberejoj de Sofio kaj Plovdiv

estis eldonataj mane skribitaj ĵurnaloj en Esperanto.

Nun, kiam ni celebras la 30-jaran jubileon de la glora Socialisma Revolucio en Bulgario, la bulgaraj esperantistoj esprimas sian altan respekton al ĉiuj samideanoj-esperantistoj, pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo, kaj sankte gardas la memoron pri ili. Samtempe ili esprimas sian estimon al ĉiuj vivaj esperantistoj, kiuj donis siajn fortojn al la batalo kontraŭ la faŝisma diktaturo.

La partopreno de la bulgaraj esperantistoj en la kontraŭfaŝisma batalo kaj la esprimita de ili internacia kontraŭfaŝisma solidareco estas ankoraŭ unu argumento pri la progresema rolo de la internacia lingvo Esperanto en la batalo kontraŭ la faŝismo, por demokratio paco kaj socia progreso.

Nenka JONKOV

TEOFIL DAŠINOV

La revoluciulo kaj esperantisto Teofil Angelov Daŝinov naskiĝis la 20-an de aŭgusto 1902 en urbo Peŝtera. Tre frue — en 1918—li eniris la vicojn de Komsomolo* kaj rapide fariĝis unu el ĝiaj plej aktivaj membroj. Profesie Daŝinov estis laboristo-seruristo. En tiuj jaroj li ellernis la internacian lingvon Esperanto kaj ekagis kiel esperantisto. Lia hejma E-biblioteko, unika tiutempe en la urbo, estas parte konservita ĝis nun.

Dum la periodo 1920—1922 Daŝinov estis persekutata pro sia komunista agado. La burĝa tribunalo kondamnis lin foreste je 9 jaroj da mallibereco.

En 1923 j. Daŝinov estis soldato en la kazerno de Peŝtera. Tie li hardiĝis kaj gvidis bone nelegalan komunistan organizaĵon, en kiu membris soldatoj, serĝentoj kaj unu oficiro — la rotestro. Bedaŭrinde, la reakciuloj je la 12-a de septembro arestis la plej multon de la partia kaj komsomola aktivularo. Teo-

fil Daŝinov sukcesis forkuri kun 5—6 soldatoj de Peŝtera. Poste li estis nelegala kaŝanto de Sofir Anastasov — Ĉiko kaj subtenis per nutraĵoj kaj armiloj la taĉmenton de Partaĉev ĉirkaŭ Bracigovo.

En 1924 li estis akceptita kiel membro de la nelegala jam Komunista Partio. En la sama jaro Daŝinov eniris la vicojn de la kontraŭfaŝisma batalaĉmento de Bracigovo. Kun ĝi poste li foriris al Greklando, de kie tra Jugoslavio migris al USSR. Tie, en la frata Soveta lando, li studis en la akademio „Frunze“ kaj fariĝis inĝeniero.

Dum la civitana milito en Hispanio (1936) Teofil Daŝinov forveturis volontule kiel artileri-oficiro en la internaciaj brigadoj por defendi la Hispanan Respublikon. Defendante Madridon kontraŭ la faŝistoj li pereis heroe en 1937.

Postmorte Daŝinov estis honorita de la nova popola ŝtato per ordeno „Por

* Komsomolo — Junkomunista Akocio.

(Sekvas sur p. 8)



Poezio kaj beletrio

GARDU LA PACON!^{*}

de Asen Grigorov

Gardu la pacon, homoj de l'Tero!
Lumas la suno sur la ĉielo.
Kia lazuro!

Kia tenero!
Pulsas la vivo en ĉiu ĉelo.
Gardu la pacon!
Viroj, virinoj de la Planedo!
Gardu la vivon!

Vivu en paco!
Firme batalu kun kora kredo
kontraŭ milito,

kontraŭ minaco!
Gardu la pacon!
Junaj,

maljunaj —
en unu rondo
ni kune kreu,
kune masonu,

^{*} La versaĵo ricevis la unuan premion en la Jubilea Literatura Konkurso de „Bulgara Esperantisto“.

Al la junaj esperantistoj en urbo
Dunaujvaros (Hungario)

por ke beliĝu tiu ĉi mondo,
por ke nur kantoj kaj rido sonu!
Gardu la pacon!

Blankaj
kaj nigraj
kaj flavaj:
kune

paŝu antaŭen
kaj sen hezito!

Se ĉiuj homoj staros komune,
ni estos fortaj kiel granito.
Gardu la pacon!

Ni al nenio plia sopiras,
krom ke nur paco surtere estu.
Ni ja nenion plian deziras,
krom ke la homoj

ĝoju
kaj festu.
Gardu la pacon!

ALARMO*

de Prodan Prodanov

Aŭgusto, 1941. La Dua Mondmilito estis en sia intensa bolado. Sed ĝi estis malproksime de nia lando, kaj ni, adoleskuloj, ne estis malhelpataj okupiĝi pri niaj pactempaj amuzoj.

Varmega somertago. Ni — Dako Tanaza, Ceko la Fantaziulo kaj mi, planadis nudpiedaj laŭ la dornokovrita kruŝo apud la urbaj vinberkampoj. Dako portis surdorse grandan sakon da pajlo. Ceko tenis enmane paperbalonon. Mi — ladan fornotubon, kaŝe prenitan el nia hejmo.

La globformaj paperbalonoj, plenaj de varma fumo kaj alte flugantaj, estis

^{*} La rakonto ricevis la unuan premion en la Literatura Konkurso de „BE“.

ne nur agrabla amuzo. Ili estis junula fiero. Per nia balono ni esperis almliti gloron kaj pleje — la admiron de la lernantinoj.

Malgraŭ la zorgema elektado de konvena loko, ni ofte trafis dornojn. La akraj pikdoloroj vekis ĉe ni koleron. Ni haltis por eligi la dornopintojn kaj adresis al ili insultojn. . . Tiamaniere mi de aĝo junula kapablis kompreni, ke la vojo al la gloro estas ne nur peza, sed ankaŭ dornokovrita. Ekzistas naviuloj, kiuj ne povas kompreni tion eĉ en solida aĝo.

Malsupre dronante en la verdaĵo de fruktarboj kaj poploj dormetis nia urbeto. Verdire, niaj samurbanoj ne su-

pozis la surprizon, kiun ni preparis por ili.

Ni atingis la „bazon“ por ekflugo de nia balono. Ĝi estis profunda kavo, el kiu la virinoj elfosis argilon por farbi la domojn. En tiu kavo ni fosis ion similan al forno. Jen, ni instalas al ĝi la fornotubon kaj eklaboris vigle. Minutoj dividis nin de la gloro. Dako ĵetis pajlon en la fornon kaj bruligis ĝin. Mi firme tenis la balonon super la fornotubo. Sur la papera surfaco videblis niaj nomoj kaj adresoj, belege skribitaj de Ceko per kemia krajono laŭ teknika skribmaniero. Nia Ceko estis lernanto en la teknika lernejo de Gabrovo kaj famigis pro iuj siaj inventoj. Lastatempe li fanfaronis pri sia projekto de „perpetuum-mobile“.

En la kavo mi sentis min kiel en ŝvitbanejo. La starado sub la fortaj sunradioj estis laciga. Parto de la kavo, kiu estis en ombro, allogis min, kaj mi petis anstataŭigon.

— Momenton! — diris Ceko kaj ligis la malsupran parton de la balono al la fornotubo per dratpeco.

— Vi riskas fuŝi nian laboron! Post iom da tempo la balono estos flugpreta kaj ni ne havos tempon malligi ĝin! — protestis Dako.

— Trankvilon, Dako! Per tio mi celas teknikan komforton! — diris Ceko gravmiene kaj venis por anstataŭi min.

Mi saltis en la kavon kun videbla kontento. Dako plifortigis la fajron. Fulmo kaj fulgoj incitis Ceko. Li komencis artifiكي:

— Malligu la balonon! Ĝi estas jam preta!

— Vi tro rapidas! Ĝi bezonas ankoraŭ da fumo! — rezistis Dako.

— Mi diras, ke ĝi estas tute preta! — insistis Ceko.

— Toleru!

— Sed mi ne povas teni ĝin plue! Ĝi vibras kaj dancas . . .

Ni provis malligi la dratpecon, sed ĝi estis tiom varma, ke niaj klopodoj ne sukcesis. La saman momenton Ceko ellasis la balonon, kiu ekflugis supren kaj forportis la fornotubon. Teruro obsedis min. Kion mi diros hejme?

Vere, la fumokvanto ne sufiĉis por nia balano. Ĝi faris vastan arkon super la urbo kaj falis sur la urban pilkludejon apud la parko. Ni ekiris tiudirekten kaj survoje akuzis unu la alian pri la malsukceso de la afero. Nia kvereltona disputado havis nenian rezulton. Ceko malagnoskis sian kulpon. Mi plendis pro la tuba. Dako solene promesis, ke alian fojon li ne enmiksos sin en similan aferon kune kun „infanoj“ kiel ni. . .

Tiel ni malsupreniris en la ebenaĵon, kaj eble ni estus povintaj savi nian balonon, se la akvoplenaj fosajoj preter la brikfarejo ne „sabotis“ nin. Ni decidis nin bani en la trankvilaj akvoj. Sen kia ajn hezito ni rapide senvestiĝis kaj saltis en la „basenojn“. Komence klara kaj travidebla, la akvo rapide iĝis malklara kiel bozao¹ kaj post la banado ni fariĝis pli malpuraj ol antaŭe. Sed, kiu priatentu bagatelojn?

La banado, kiu refreŝigis nin, montriĝis fatala por ni kaj por nia balono. Kiam ni proksimiĝis al la pilkludejo,

¹ Bozao — miliotrinkaĵo kun flavbruna koloro.

(el pago 6)

popola libereco 1941—1944 j.“ kaj per medalo „Por partopreno en la popola ribelo de 1923 jaro“.

La esperantistoj en Peŝtera, organizitaj en E-societo „Nova Epoko“ kaj la junulara grupo „Georgi Dimitrov“

ĉiujare en majo organizas renkontigon de esperantistoj kaj E-ekspozicion memore al sia samurbano-esperantisto, kiu oferis sian vivon por la socialisma kaj komunisma estonteco.

Sterjo KUKUŜEV



ĉirkaŭ la balono estis preskaŭ la tuta vira loĝantaro de nia urbeto. La homoj staris je „honora“ distanco de policista kordono, kiu sieĝis la pilkludejon. La ĝendarmoj tenis enmane ŝargitajn karabenojn. Kaŝita malantaŭ trunko de sovaĝa pirujo la plicestro observis antaŭ si per binoklo. La tereno, kie falis nia balono, estis blokita. . .

Komence ni komprenis nenion. Kolektiĝinte en grupetoj niaj samurbanoj pridiskutis la „taktikon kaj la strategion de la nuntempa milito“. La plej grandaj „militekspertoj“ nature estis tiuj, kiuj neniam partoprenis militon.

Aliloke la preĝeja kantisto avo Darnail citis la Novan Testamenton, sed neniu aŭskultis lin. . .

La urbestro, iama advokato sen klientaro kaj rezerva oficiro, estis trovinta obeeman aŭditorion kaj oratoris:

— Mi ĉiam asertis, ke urbo kiel nia bezonas garnizonon. Almenaŭ unu batalionon. Vi ĉiuj vidas: unu mizera bolŝevisto tenas nin en situacio de ŝak-averto!

— Tute prave, sinjoro urbestro! — diris flatemuloj serveme.

Estas monakoj, kiuj dum sia tuta ekzistado deliras pri diabloj kaj fantomoj. Nia urbestro similis al tiuj diaj servantoj: li deliris pri bolŝevistoj. La penso pri ili konfuzis lian dormadon.

— Se ni havus garnizonon, ni likvidus la bolŝevisman danĝeron! Urbo sen garnizono estas nulo! La garnizonoj estas la viva ornamo de la urboj! Atributo de la ŝtata potenco! . . .

En tiu momento la masonisto majstro Raŝko, rezerva ĉefserĝento dum la Uua Mondmilito, malvarmigis la ekstazon de la urbestro:

— Via moŝto, kial la ĝendarmoj staras kiel vivaj pafceloj? Ili devas kuŝi surtere! Se la sieĝato komencos pafi per maŝinpafilo, neniuj restos viva. Kaj la urbanoj? Ĉu ili volas kuglojn? Tio ne estas foira amuzo!

La rimarko vundis la memsenton de la urbestro. Subalterna rangulo kuraĝis

instrui lin, la rezervan oficiro. . . Sed li agnoskis la argumentojn de la masonisto kiel pravajn. Li maskis sian koleron kaj respondis:

— Mi vidas tion, majstro Raŝko, sed la ĝendarmoj havas sian komandanton! Ne estus bone, ke mi enmiksiĝu en liajn prerogativojn. . .

— Tiam ili pereu! — diris la masonisto severtone kaj komencis admoni la urbanojn retiri sin je unupaŝa distanco.

Liaj admonoj efikis. La vorto „maŝinpafilo“ frostigis ĉies sangon kaj la urbanoj obeeme retiris sin.

La saman tempon la urbestro ordonis al Ganjo la Kampogardisto iri al la plicestro por transdoni al li proponon, ke li ordonu al la ĝendarmoj surterigi.

— Mi ne kuraĝas, via urbestra moŝto! La vivo estas al mi kara! — balbutis Ganjo timeme.

— Iru!

— Infanojn mi havas, siujoro urbestro!

— Iru aŭ morgaŭ vi estos eksoficiĝita!

Vole-nevole la tremanta Ganjo alkuris al la plicestro kaj transdonis la proponon de la urbestro. Aŭdiĝis komando:

— Surteren!

La ĝendarmoj kuŝiĝis sur la varman teron. . .

Nia triopo sentis sin kiel en la sorĉa mondo de la neordinaraj sonĝoj. Ĉio estis por ni stranga enigmo. La pli aĝajn ol ni ni ne kuraĝis demandi. Postuli informojn de la malpli aĝaj ol ni — tiu estis sub nia indeco. Finfine mi vidis lernejan kamaradon, Vanko la Ĉioscia. Tiun kromnomon li estis akirinta pro sia scivolemo. La mondo ne konis pli grandan scivolemulon ol li. Liaj oreloj estis veraj klaŭlaj antenoj. Al mia demando „Kio okazis?“ li respondis:

— Ĉu vi falis de Marso? La tuta loĝantaro de la urbo scias, kaj vi ankoraŭ „blekas“ . . . Hodiaŭ ĉi tien alteriĝis soveta paraŝutisto. La deĵoraj

observantoj de la kontraŭaviadila posteno en la urba arbidejo vidis lin iom da tempo antaŭ la alteriĝo. La paraŝuto ŝvebis malrapide kaj sub ĝi pendis la bolŝevisto, vestita en nigra kombinezono. . .

La Ĉioscia lasis min senrevigita kaj iris al diskutanta grupo por kapti ion interesan. . .

Ni estis kiel fulmofrapitaj. Unua rekonsciigis Dako Tanaza. Li balancis kapon kaj flustris al ni:

— Fratetoj, la tuta alarmo estas pro nia malfeliĉa balono! La „dormemuloj“ el la arbidejo miskonis ĝin kiel paraŝuton!

— Sed oni diris, ke estis nigrevestita homo! — rebatis Ceko liajn vortojn.

— Tio estas la fornotubo! — diris Dako firme.

La vero estis pli klara ol la tago mem.

— Ĉu la afero estas danĝera por ni? — mi demandis ne sen timo.

— Kompreneble! Ceko surskribis niajn nomojn kaj adresojn. La ĝendarmoj ne pardonos al ni tiun „gimnastikon“, kiun ni altrudis al ili entiu ĉi varmega tago! Ĉiu el ni eskapu kaj kaŝu sin en la terfundo! — proponis Dako prudente.

La optimismo forlasis nin kaj pro malespero ni klinis la kapojn. . .

„La dormemuloj en la arbidejo“ estis la posteno, kreita laŭ la ideo de nia militema urbestro. Ĝi konsistis el kvar civile mobilizitaj urbanoj, armitaj per binoklo kaj telefono. La homoj deĵoris dumtage. Ili havis la taskon observi la ĉielon kaj anonci pri eventualaj „malamikaj“ aviadiloj. Fakte la deĵorantoj utiligis la tempon tre racie: ili kartludis kaj amuzis sin laŭplanĉe. Plej ofte ili direktis la binoklon al la dua etaĝo de la proksime staranta fervojstacio, kies fenestroj proponis interesan panoramon. Tie estis la loĝejoj de la stacidomaj oficistoj. En tiuj varmaj tagoj la dommastrinoj, nenion suspektan-

te, laboris hejme neglekte vestitaj, en intima tolaĵo nur. . . En tiuj momentoj la bravaj observantoj ne kapablis bridi sian admiron kaj ruĝe okulsignis unu al alia. Ofte aŭdigis senpaciencaj admonoj: „Donu la binoklon al mi! Ne estu egoisto!“

La falanta „paraŝutisto“ estis vidita! de observanto per nearmita okulo, ĉar la saman tempon la binoklo estis direktita al la konata tera objekto. . . La telefono ekzumis. La poliestro alarmis siajn policanojn. Armitaj ĝis dento ili alkuris al la indikita loko kaj sieĝis la pilkludejon. Oni supozis, ke ĉirkaŭ la urbestro estas aliaj paraŝutistoj. . . La urbestro petis armitan helpon de la najbaraj urboj, kie estis garnizonoj. La garnizonaj komandantoj sendis infanteriajn rotojn per ĉevalĉaroj. El la distrikta urbo ekveturis motorbiciklista kolono de armitaj policanoj. . . Unuvorte — alarmo!

Atendante la helpon, nia poliestro provis intertrakti kun la „sieĝato“. Li elpoŝigis blankan naktukon, ŝvingis per ĝi kaj laŭte kriis:

— He, vi-i-i! Kapitulu-u-u! Via rezisto estas senprudenta-a-a!

La „sieĝato“ silentis. Li rifuzis intertrakti. . .

La poliestro ripetis sian inviton kelkfoje, tamen senrezulte.

La multnombra publiko atendis ian solvon. La nervoj estis streĉitaj.

Jen, de la soseoj aŭdigis motorbruado kaj akutaj signaloj. La distriktaj policanoj venis. La motorbicikloj proksimiĝis kaj haltis. De ili vigle saltis polkoviritaj policanoj kaj sinvicigis. La noveveninta poliestro kiel pli altranga prenis sur sin la komunan komandon de ĉiuj armitaj homoj, kiuj formis atakan-tan ĉenon. . . La plej nervemaj el la urbanoj ŝtopis siajn orelojn per la fingroj. La plej timemaj eskapis. Nia triopo ankaŭ malaperis kaj pro tio ne ĉestis la skandalan kverelon inter la du poliestroj kaj la urbestro. Nek la netole



reman ridon de la urbanoj, kiuj primokis la policianojn.

Iom da tempo — kaj al nia domo venis koleraj ĝendarmoj. Post preciza serĉado ili trovis min en la kelo, kie mi kaŝis min en malplena barelo. Malgraŭ la energiaj protestoj de mia panjo, ili arestis min. En la arestejo mi trafis Ceko-n la Fantaziulon. La araneaĵoj sur lia kapo montris, ke li kaŝis sin en la subtementejo. Dako mankis. Anstataŭ lin oni estis alkondukontaj lian patron.

La koleriginta policestro insultis nin kaj imputis al ni la kulpon de ĉiuj malfeliĉoj en la mondo. Lia opinio ni estis krimuloj, kiuj finputros en malliberejoj. Finfine la afero estis likvidita: ni ricevis serion da vangofrapoj kaj niaj patroj — monpunon.

Longan tempon mi ne povis kompreni, kial mia patro, kiu ŝpartremis pri ĉiu monero, pagis la monpunon tiel trankvile. Kaj ne riproĉis min.

Ĉe la vesperiĝo mi rehejmiĝis kune kun mia patro. Li diris kviete:

— Kiel mi revas vidi sovetan sol-

daton!

Laŭ la ĉefa strato ni renkontis armean veturilaron, kiu transportis soldatojn. Tio estis la unua garnizona helo. . .

La sekvan tagon disaŭdiĝis la novaĵo, ke la kontraŭaviadila posteno en la arbidejo ne plu ekzistas.

Kaj Georgo la Anoncisto, post la kurtima tamburado, tralegis la urbestran ordonon:

„Pro la milita situacio neniuj urbano, sen diferenco de aĝo kaj sekso, rajtas produkti paperbalonojn kaj flugigi ilin. La neobeantoj estos severe punataj!“

— — — — —

Tri jarojn post tio, en bela septembra tago, la revo de mia patro realiĝis. Unue en la urbeton venis la partizanoj. Kune kun la laborpopolo ili likvidis la iaman regpotencon kaj establis novan — tiun de la Patrolanda Fronto. Post iom da tempo la urbanoj ĵetis florojn sur la unuajn trupojn de la Ruĝa Armeo-Liberiganto, kiuj eniris la urbeton.

GRATULOJ LIGE KUN LA 30-JARA JUBILEO

Lige kun la 30-jara jubileo de la Naŭseptembra Socialisma Revolucio en nia lando CK de Bulgara Esperantista Asocio kaj la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ ricevis multajn gratulojn el la lando kaj eksterlando: de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, de Esperanto-Komisiono de Uzbeka Asocio por Amikeco kaj Kulturligoj kun Eksterlando kaj la Esperantista Klubo ĉe Taŝkenta Domo de Sciencistoj, de Junulara E-klubo en Ufa kaj la esperantistoj en la Kuzbasa Politeknika Instituto (USSR), de Centra Laborrondo Esperanto de GDR, de la Rumana esperantistaro, de Distrikta Laborrondo ĉe Kulturligo de GDR en u. Rosl'ock, de japana familio Masumi kaj Tacuo Huĝimoto, de la Interdistrikta Renkontiĝo de Esperantistoj en Velingrad lige kun la celebrazo de la pereintaj en la batalo kontraŭfaŝistoj V. Peeva, Stoju Kalpazanov kaj A. Ĉopev, de la Distrikta E-Komitato en Stara Zagora, de la Plenkunsido de Distrikta E-Komitato en Plovdiv, de la jara kunveno de E-Societo „Vekiĝo“ en Ŝumen kaj de multaj aliaj.

Ni dankas sincere la gratulojn kaj bondeziras novajn sukcesojn al niaj eksterlandaj amikoj kaj al ĉiuj bulgaraj esperantistoj sur la kampo de konstruado de nova, pli feliĉa vivo, de paco kaj internacia amikeco!

ORGANIZA VIVO

ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN PEŜTERA

En u. Peŝtera okazis la 5-a Renkontiĝo de la Esperantistoj el la distriktoj de Pazarĝik kaj Plovdiv.

Ĉi estis dediĉita al la 30-jara jubileo de la Socialisma Revolucio en nia lando kaj memore al la esperantisto kaj interbrigadano en la Hispana Civitana Milito Teofil Daŝinov. Pli ol 100 esperantistoj el la du najbaraj distriktoj en la frua maja mateno prezentis florkronojn antaŭ la monumento de Daŝinov en Peŝtera. Poste ili ĉeestis solenan kunvenon en la granda salono de la teknikumo de tabakteknologio. La prezidanto de E-Societo „Nova Epoko“ en Peŝtera Ŝterjo Kukuŝev parolis pri la vivo kaj agado de Daŝinov, pri la agado de la junulara E-grupo „G. Dimitrov“ ĉe la teknikumo kaj aparte pri la aranĝita de ĝi ekspozicio sub devizo „La paco — afero de ĉiuj“ rezulte de vigla kolektiva kaj individua E-korespondado. En la nomo de la Urba Soveto estis dekoritaj per la insigno de urbo Peŝtera 15 E-aktivuloj el la distrikto. Fine estis akceptitaj saluttelegramoj al CK de BKP kaj CK de BEA.

Estis oficiale malfermita la ekspozicio en la lernejo. Plej grandan helpon al la junaj esperantistoj por prepari ĝin donis la sekcioj de MEM en diversaj landoj, la radioj de Varsovio kaj Bratislava. Sendis materialojn la asocio de slovakaj kaj finlandaj esperantistoj, la kongreso de francaj esperantistoj en Parizo, la esperantistoj el Uzbekistano kaj apartaj esperantistoj el Romens (Francio), Bratislava kaj Praha (ĈSSR) Klagenfurt (Aŭstrio), Huskavarna (Svedio), Maenco (GFR), Avdeevka kaj Ĉerkesk (USSR), Lublin (Pollando) k. a. Tre interesajn materialojn sendis ankaŭ la junularaj E-rondoj „Zamenhof“ en Hispanio, „Globus“ en Ukrainio, la Junulara Domo en Lublin (Pollando) k. a.

Post la trarigardo de la ekspozicio ĉiuj esperantistoj partoprenis la ekskurson al belega rodopa groto „Snejanka“ en la ĉirkaŭaĵo de Peŝtera.

La partoprenantoj en la renkontiĝo disiris al siaj loĝlokoj plivigliĝintaj por nova fruktodona E-laboro.

A. Kukuŝeva

PROMESO DE ESPERANTA AKTIVULINO

Ĉi-jare atingas 50-jaraĝon nia aktiva samideano Rajna Stanĉeva el urbo Ŝumen, membro de DK de BEA en tiu ĉi urbo, fondinto kaj multjara estrarano de E-Societo „Progreso“ en la Uzino por Sargŭtombiloj en la sama urbo, nun sekretariino de E-Societo „Ivan Kandeŭ“ en la Uzino por Postaŭtomobilaj Veturiloj en u. Preslav. En la Centra Komitato de BEA estis ricevita jena letero-promeso de s-anino Stanĉeva:

Kamaradoj,

Honore al la 30-jara jubileo de la Socialisma Revolucio en nia lando ĉiu membro de la novefondita E-Societo „Ivan Kandeŭ“ en Preslav promesas varbi dum tiu ĉi jaro ankoraŭ unu membron de la Societo. Do, nia membraro duobliĝos!

Honore al tiu ĉi glora tutpopola jubileo kaj lige kun mia persona 50-jara jubileo mi, kiel sekretariino de E-Societo „Ivan Kandeŭ“ kaj membro de la estraro de Distrikta E-Komitato en Ŝumen — respondeculo pri la propagando de Esperanto en la distrikto, promesas:

1. *Helpi la fondon — jam tiun ĉi jaron — de ankoraŭ 2 E-societoj en mia naskiĝurbo Preslav, kie nun mi laboras — unu civitanan kaj unu lernejanan.*

2. *Gvidi E-kursojn ĉe la tri societoj en Preslav kaj en 1975 jaro varbi almenaŭ 3 profesiajn instruistojn por la Internaciaj Instruistaj E-Kursoj en Burgas.*

3. *Fari 10 prelegojn pri la signifo kaj rolo de Esperanto — pere de la urba radio-reto, en Popola Leĝejo „Razvitie“ kaj en lernejoj.*

4. *Insisti, ke en la urbo oni starĝu voĉmontraĵajn surskribojn ankaŭ en Esperanto.*

5. *Aktive partopreni la preparon de solena celebromemore al Ivan Kandeŭ — la patrono de nia E-Societo — lige kun la 30-jariĝo de lia mortigo fare de la faŝistoj (celebro aranĝota kune kun la Urbaj Komitatoj de BKP kaj Patrlanda Fronto kaj Fakoj „Kulturo“ ĉe la Popola Soveto).*

6. *Centprocente kolekti kaj sendi al BEA la kotizojn de ĉiuj membroj de nia nova E-societo.*

Kun varmaj esperantistaj salutoj,

R. Stanĉeva



En la Literatura Konkursko de „Bulgara Esperantisto“, dediĉita al la 30-jara jubileo de la Socialisma Revolucio en Bulgario, partoprenis entute 38 esperantistoj el 11 landoj, kiuj prezentis 84 verkojn. Inter ili: 30 viroj kun 58 verkoj (25 poeziaĵoj kaj 33 prozaĵoj) kaj 8 virinoj kun 26 verkoj (18 poeziaĵoj kaj 8 prozaĵoj). Estis prezentitaj 50 originalaj verkoj (21 poeziaĵoj kaj 29 prozaĵoj) kaj 34 tradukitaj verkoj (poezio — 23, prozo 11). Do, konsiderinde pli granda estas la partopreno de viroj en la konkursko. Evidenta estas ankaŭ la emo de niaj samideanoj al la poezio, kaj la prefero de la samideanoj al la prozo.

Laŭ landoj: Bulgario — 18 personoj kun 43 verkoj; Sovetunio — 8 kun 17 verkoj; Pollando — 3 kun 4 verkoj; Hispanujo — 2 kun 3 verkoj; Usono — 1 kun 6 verkoj; Danujo — 1 kun 5 verkoj; Rumanio — 1 kun 2 verkoj kaj po unu persono el GDR, GFR, Jugoslavio, Francio kun po 1 verko.

La konkursaj estis atente juĝitaj de 2 apartaj ĵurioj — unu por poezio kaj alia por prozo. Jen la premiitoj:

A. POEZIO

I. Originala poezio

I premio: Asen Grigorov — Sofio, Bulgario — pro la versaĵo „Gardu la pacon!“

II premio: Ekaterina Majburova, u. Kiev, Sovetunio — pro la versaĵo „Lulkanto“.

III premio: — Penka Papazova, u. Jambol, Bulgario — pro la versaĵo „Kanto pri mia patrujo“.

III premio: Danĉo Danĉev, blinda esperantisto el u. Plovdiv, Bulgario — pro la ciklo „Nia festo“.

III premio: Julius Balbin, Nov-Jorko, Usono — pro la versaĵo „Pigmalion“.

Laŭdaj mencioj: Prodan Prodanov, Sofio, Bulgario — pro la versaĵo „Nostalgie“; Karl Joachim Thormann, u. Schwerin, GDR — pro la versaĵoj „La Trakia Fluto“ kaj „Forpermeso al la Nigra Maro“.

II Tradukita poezio

I premio: Nikolaj Fedotov, u. Novoĉerkask, Sovetunio — pro traduko de versaĵoj de A. S. Puŝkin: „Malliberulo“, „Al A.P. Kern“, „Profeto“ kaj „Ĉu mi en brua strato promenado“.

II premio: Ekaterina Majburova, Kiev, Sovetunio — pro traduko de la versaĵo „Se vin trompas via vivo...“ de A. S. Puŝkin.

III premio: Julius Balbin, Nov-Jorko, Usono — pro traduko de tri poemoj de Pablo Neruda: „Mi povas skribi la versojn...“, „La forgeso“ kaj „La korpo de virino“.

III premio: Zefira Dimitrova, Varna, Bulgario — pro traduko de tri novaj bulgaraj popolokantoj: „Traktoristino“, „Kanto pri la barajlago“ kaj „Minista Kanto“.

B. PROZO

I. Originala prozo

I premio: Prodan Prodanov, Sofio, Bulgario — pro la rakontoj „Alarmo“ kaj „Ĉe la blanka Danubo“.

II premio: Hirs L. Branzburg el u. Luga, USSR, — pro la rakonto: „Alkanzar“.

III premio: Kazimierz Szczurek, u. Cieszyn, Pollando — pro la rakonto „Fortuna variabilis“.

II. Tradukita prozo

I premio: Stefan Ganev Popov, u. Ruse, Bulgario — pro la traduko de fragmentoj el verkoj de Georgi Karaslavov „La nekredenda“ kaj „Lenko“.

II premio: Kazimierz Szczurek, u. Cieszyn, Pollando — pro la traduko de fragmento e la romano „Mirtala“ de Eliza Orzeszko.

III premio: Ilija Ivanov Iliev, u. Loveĉ, Bulgario — pro traduko de la skizo „Nekantita Kanto“ de Nikolaj Paniev.

Gratulon sinceran al la premiitoj! Dankon al ĉiuj partoprenintoj en la Konkursko de „BE“! Sanon, feliĉon kaj pluajn pli grandajn sukcesojn ni bondeziras al ĉiuj! Ankaŭ regulan kunlaboradon al nia revuo!

La Redakcio



La 12-a de julio ĉ. j. en Sofio post longa suferado forpasis 77-jaraĝa

Maria Petrova Saralieva

esperantistino de 1924, sindone laborinta por la disvastigo de Esperanto en u. Varna, multjara estrarano de E-Societo „Albato“, eksmembro de CK de BEA. Ŝi partoprenis aktive la kontraŭfaŝistan batalon.

Niajn kondolencojn al ŝiaj proksimuloj!

LA SOLENA INAŬGURO DE LA KONGRESO

La 28-an de julio, dimanĉon, je la 10-a horo estis malfermita la 59-a UK de Esperanto en Hamburgo (FRG). En la salono „Zamenhof“ en la moderna „Kongres Centrum“ kolektiĝis pli ol 1650 kongresanoj el kvindek landoj kaj ĉ. 200 gastoj el Hamburgo.

Bonvenigis la kongresanojn la dua urbestro, prof. d-ro Biallas, kiu samtempe estas senatano pri kulturo.

D-ro Rommel, ministeria konsilisto en la Federacia Ministerio pri Scienco kaj Klerigo, transdonis la salutojn de sia ministro, s-ro Helmut Rohde, la protektanto de la 59-a UK.

Salutis la Kongreson reprezentantoj el 18 landoj, inter kiuj ankaŭ k-do Vasil Vasilev — el la Bulgara Konsulejo en Hamburgo, kiu salutis en la nomo de la ministro de eksteraj aferoj de PR Bulgario Petr Mladenov kaj invitis la 62-an UK de Esperanto en Bulgarian (1977 j).

Pro tempomauko la salutontoj en la nomo de naciaj E-organizaĵoj el 35 landoj nur povis esti prezentitaj al la kongresanoj.

La solena inaŭguro finiĝis per festparolado de la prezidanto de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna. Post superrigado pri la historio de la universalsaj kongresoj de Esperanto, omaĝo al la kongresa lando kaj pritrakto de la kongresa ĉeftemo, prof. d-ro Lapenna deklaris, ke li retiriĝos dum tiu Kongreso el ĉiuj siaj funkcioj en la Universala Esperanto-Asocio.

La solenaĵo estis finita per komuna kantado de la Esperantista Himno.

ĜENERALAJ KUNVENOJ DE UEA

Okazis du ĝeneralaj kunvenoj.

En la unua oni aŭdis la salutojn de reprezentantoj de 15 internaciaj E-organizaĵoj kaj instancoj kaj diskutis la raporton de la Estraro de UEA pri la laboraro 1973/74.

En la dua ĝenerala kunveno oni traktis la temon „Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo“ La enkondukan paroladon faris prof. d-ro Ivo Lapenna. Sekvis vigla diskutado, en kiu partoprenis ankaŭ la prezidanto de BEA k-do N. Aleksiev.

59-a UNIVERŝALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hamburgo — 1974

TRA LA FAKKUNVENOJ

Ankaŭ ĉi-jare okazis pluraj fakkunvenoj de kongresanoj. Jen kelkaj tute koncizaj notoj pri ili:

Mondpaca Esperantista Movado (MEM)

Ĉeestis ĉ. 70 personoj el ĉiuj kontinentoj. Okazis vigla libera diskutado pri la eblecoj de esperantistoj partopreni la pacbatalon. La prezidanto de MEM Nikola Aleksiev prezentis la platformon aprobitan de la Tutmonda Kongreso de Pacamaj Fortoj en Moskvo (1973).

Monda turismo

Ĉeestis ĉ. 230 personoj el kvin kontinentoj. Unu el la plej sukcesaj kaj fruktodonaj fakkunvenoj ĝis nun. Akceptita rezolucio, kiu rekomendas eldonon de pli da lerniloj kaj informiloj por turistoj kaj vastigon de la kontaktoj kun vojaĝoficejoj kaj aliaj turistaj instancoj. Krome regule eldoni pli ampleksan turistan kalendaron; eldoni turisman bulletonon „Turismo per Esperanto“ en diversaj lingvoj.

Fervojistaj aranĝoj

Tre sukcesa fervojista tago. 80 fervojistoj kolektiĝis en la granda salono de la Fervoja Direkcio de Hamburgo. Salutoj de plej altrangaj fervojistaj funkciuloj de la urbo. Faka prelego pri la paŝoj por modernigi nuntempe diversspecajn vagonojn ekstere kaj interne. Posttagmeza ekskurso kun vizito de Kontenera Terminolo kun ĝiaj gigantaj instalaĵoj k. a.

Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA)

Ĉeestis 40 medicinistoj el 12 landoj. UMEA jam disponas pri reto de delegitoj en 30 landoj. „Medicina Internacia Revuo“ aperas dufoje jare.

En UK de Esperanto en Beograd (1973) d-ro Shinoda (Japanio) fondis specialan premion por tiuj kuracistoj, kiuj aperigas siajn esplorojn esperantlingve. Ĉi-jare du hungaraj kuracistoj — d-roj István Nagy kaj János Török, gajnis la premion (arĝentan medalon kaj 200 ned. gld.) pro sia komuna studo „Mezuro de ekstera kraniovolumeno ĉe infanoj“.



Internacia Scienca Asocio Tutmonda (ISAE)

Jara kunveno (ĉeestis 37 personoj) Entute la Asocio havas 566 membrojn. La Filologia Sekcio preparas novan numeron de „Scienca Revuo“. Enkadre de la kongreso estis fondita Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj Prof. Vasil Peevski (Bulgario) sciigis, ke a organo de Internacia Asocio de Sciencistoj, „Scienca Mondo“, aperos ankaŭ en Esperanto post solvo de iuj teknikaj kaj financaj problemoj.

Dum la kongrestagoj okazis ankaŭ pluraj aliaj fakkunvenoj: de instruistoj, ĵurnalistoj, filatelistoj, filologoj, E-akademianoj, ornitologoj, militrezistantoj, poŝtistoj, aŭtomobilistoj, E-veteranoj, kristanoj (ortodoksaj kaj katoli-

kaj), juristoj, skoltoj, muzikistoj k. a.

Aparte notinde estas, ke enkadre de la 59-a UK okazis la 42-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, kies laboron parto prenis ĉ. 130 samideanoj.

En la 14-a Internacia Infana Kongreseto partoprenis 17 infanoj el 6 landoj.

Kromaj kunsidoj, kunvenoj kaj aranĝoj

Pro manko de loko ĉi tie ni ne povas iom detale informi pri kelkaj aliaj kongresaj eroj, sufiĉe interesaj, nome: La debato „Landaj revuoj en Esperanto — ĉu utilaj?“, la publika debato de TEJO, la laborkunsido je temo „Kion fari kontraŭ perdo de membroj“, urba akcepto, filmprezentoj, ekskursoj, interkona vespero, oficiala bankedo, oficiala balo k. a.,

INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO (ISU)

Estis faritaj jenaj prelegoj de fakuloj:

1. *Bazaj juraj aspektoj de la eŭropaj organizadoj* — de Ivo Lapenna — doktoro de juro, profesoro en la Universitato de Londono.

2. *Kiu nutras nin homojn sur la tero?* — de Sin'tiro Kawamura — doktoro, profesoro de biokemio en la Universitato de Kagaŭa (Japanio).

3. *Pli bona kompreno de aliaj landoj kaj popoloj pere de moderna geografia instruado* — de Helmut Ebinger — doktoro de naturscienco, profesoro de geografio en la Universitato de Hamburgo.

4. *La nuntempa agrikulturo kaj hortikulturo kaj ilia kontribuo al kreado de sana medio por la homaro* — de Oton Pancer — doktoro de agrikulturaj sciencoj, profesoro en la Universitato de Zagrebo.

5. *Urgaj taskoj de la scienco en la proksima estonteco* — de Paul Neergard — doktoro de agronomio, direktoro de la Dana Instituto de Sempatologio por Evolulandoj, Kopenhago.

6. *La malkovro de polvaj terlunoj* — de

Kazimierz Kordylewski — doktoro de filozofio, docento de astronomio ĉe Jagielona Universitato en Krakovo (Pollando)

7. *Kanaria insularo kaj ĝia birdo la kanario* — de Juan Régulo Pérez — doktoro de filologio, profesoro de romanida filologio kaj katedra profesoro de Esperanto en la Universitato de La Laguna (Hispanujo).

8. *La rolo de sciencisto en evoluo de lingvo* — de Mahomet Izmailoviĉ Isaev — doktoro de filologiaj sciencoj, supera scienca kunlaboranto ĉe la Lingvistika Instituto de la Akademio de Sciencoj de Sovetunio

9. *La didoj, birdoj ekstermitaj kaj pridiskutataj* — de C. Stjep-Bowitz — doktoro, profesoro en la Universitato de Oslo (Norvegio).

10. *La inkunabloj de Esperanto* — de Gaston Waringhien — profesoro de franca literaturo en la Brita Instituto, Parizo, prezidanto de la Akademio de Esperanto.

11. *La scienco kaj la internacia lingvo* — de Vasil Peevski — profesoro de geodezio ĉe Teknika Universitato de Sofio.

LABORKUNSIDOJ DE LA KOMITATO DE UEA

La kunsidojn de la Komitato de UEA en Hamburgo partoprenis rekorda nombro de komitatanoj: 61 el 65.

En la unua kunsido la komitatanoj A (nomitaj de la landaj asocioj) kaj B (elektitaj de la delegitoj de UEA) balotis por 13 personoj el 29 kandidatoj por komitatanoj C.

En sia nova konsisto la Komitato elektis ankaŭ novan Estraron de UEA, kiu poste, en aparta kunsido, disdividis la taskojn jene: prezidanto: d-ro H. Tonkin, Britio — ekstraj rilatoj, kulturaj agadoj;

vicprezidanto: d-ro W. Bormann, FRG — landaj asocioj;

vicprezidanto: prof. C. Stjep-Bowitz (C. Stjep-Bovic, Norvegio), — scienca kaj faka agado ĝenerala sekretario: E. L. M. Wensing, Nederlando — administrado, informado;

estrarano: d-rino F. Szabo-Felsö (F. Sabo-Felsjo), Hungario — kongresoj de UEA; estrarano: S. Swistak (Svistak), Pollando — turismo;

estrarano: d-ro Denoël, Belgio — specialaj taskoj, precipe unueco de la E-movado. Multan atenton la Komitato donis al diskutado de la asocia agado — ĝisnuna kaj es-tonta, al la financaj kaj administraj proble-moj,



BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA

Antaŭ proksimume 200 aŭskultantoj prof. Waringhien, la prezidanto de la prijuĝa komisiono, anoncis la rezultojn de la Belartaj Konkursoj de UEA por la jaro 1974:

Originala poezio

I kaj II premioj: Nealjuĝitaj.

III premio: Egale al Masayuki Kuroda (Japanio) — por „Supren penetris frost“ kaj Ueyama Masao (Japanio) — por „La migranto“.

Traduka poezio

I kaj II premioj: Nealjuĝitaj.

III premio: Gaudenzio Pisoni (Italio) — por „Al Silvja“ de G. Leopardi.

Originala prozo

I premio: Nealjuĝita.

II premio: Andreo Szabo (Hungario) — por „Alaŭda adiaŭo“.

III premio: Endre Toth (Hungario) — por „Aŭtuno“.

Laŭda mencio: Miĥail Ŝekergiev (Bulgario) — por „Persisto“.

Originala dramo

I kaj II premioj: Nealjuĝitaj.

III premio: D-ro Ludoviko Izak (Ĉeĥoslovakio) — por „Sabro kaj purpuro“.

Nova talento: Aldo de Giorgi (Italio) — por „Viaj m:oj“ (originala poemo).

La konkurso eniris 118 verkoj, el kiuj nur 90 estis prijuĝitaj kaj 28 ne eniris la prijuĝan procezon pro mankoj aŭ nekompletecoj.

Aŭtoroj: 48 el 23 landoj, plej multe el Bulgario (6), el Hungario kaj Pollando (po 4).

La plej multaj konkursaĵoj estis en la branĉo de poezio — 50 originalaj kaj 30 tradukitaj. Estis ankaŭ 33 prozaĵoj kaj nur 5 dramoj.

Oratora konkurso

Antaŭ ĉ. 200 aŭskultantoj partoprenis la Oratoran Konkurson 3 personoj. La rezultoj:

I premio: Nealjuĝita

II premio: P. Felső (Hungario) — je temo „Kion volas la junularo en la E-movado“.

III premio: A. Bickel (Svislando) — je la sama temo.

KONGRESAJ REZOLUCIOJ

1.

La 59-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Hamburgo de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto 1974 kun 1650 partoprenantoj el 50 landoj

diskutis la ĉeftemon „Naciismo kaj internacia kunlaboro en la hodiaŭa mondo“,

ARTAJ AKTIVECOJ

Enkadre de la 59-a UK okazis artaj aranĝoj, kiuj aparte plezurigis la kongresanojn. Tio estis: la Germana Vespero, la Teatra Vespero, la Internacia Arta Vespero

La Teatron Vesperon plene okupis la prezento de la fama komedio de Beaumarché „La barbiero de Sevilla“ fare de Bulgari Esperanto-Teatro.

La ĉefaj rolantoj estis la artistoj Petăr Vučkov (Figaro), Kosta Conev (Don Bazilio), Anani Javasev (grafo Almaviva), Nikolaj Binev (d-ro Bartholdo), Jorĵeta Ĉakárova (Rozina). La spektaklo estis tre entuziasme renkontita de la internacia E-publiko.

La varian programon de la Internacia Arta Vespero partoprenis japana danctrupo, la slovakva kvarteto „Esperanto“ kaj la E-kantistinoj Margaret Hill (Britio), Barbera Kohl (Luksemburgo), Ramona Van Dalsen (Nederlando), Jordan Karagiozov (Bulgario). Aparte brile preteĝitis la vaste konata jam al la E-publiko bulgara operkantistino Maria Angelova kaj la baritono Veselin Damjanov el la Muzikteatro „St. Makedonski“ — Sofio.

SOLENA FERMO

En la solena fermo de tiu ĉi eventoplana Kongreso aparte grava momento estis la parolado de la nova prezidanto de UEA d-ro Tonkin, kiu dankis al la ĝisnuna Estraro kaj speciale al prof. d-ro Lapenna, substrekante liajn grandajn meritojn por UEA kaj ĝenerale por Esperanto. Li dankis al ĉiuj apartaj personoj, instancoj kaj LKK, kiuj helpis la bonan organizon de la Kongreso.

Plue d-ro Tonkin alvokis al pli vasta utiligo de laborfortoj en la Movado: la Estraro gvidu, sed ne necese mem plenumu la tutan farendan laboron. Substrekinte la principon de neŭtraleco kaj la intensigotan atenton al la Esperanta Kulturo, d-ro Tonkin finis per la vortoj, ke li transprenis la prezidantecon en malfacilaj cirkonstancoj, kaj per: alvoko por reunuiĝo de ĉiuj fortoj „por la batalo, kiu staras antaŭ ni“.

La kongreso estis fermita per invito al la 60-a UK de Esperanto en Kopenhago 1975.

konstatas, ke nun tre plifortiginta potenco de unuopaj ŝtatoj povas mal-favore influi la gravan rolon de la internaciaj institucioj, kiuj estas nepre necesaj por la plua evoluo de la mondo en la spirilo de la internacia kunlaboro,

substrekas, ke unu el la kaŭzoj por tiu tendenco estas la ankoraŭ nesu-



fiĉa subteno de internaciaj institucioj flanke de vastaj popolamasoj, kiuj bezonas por siaj ĉiam pli intensiĝantaj rilatoj facilan rimedon de interkompreniĝo, kiu prezentiĝas en la Internacia lingvo Esperanto,

sekve atentigas pri la utilo, kiun donus al internacia kunlaboro la apliko de Esperanto kiel solvo de internaciaj lingvaj problemoj.

2.

La 59-a UK de Esperanto, *notinte*, ke Unuiĝintaj Nacioj decidis organizi vastan dekjaran agadon kun la celo elradiki rasismon kaj ĉiujn formojn de rasa diskriminacio,

konstatante ankoraŭ foje, ke la respekto de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj estas baza kondiĉo por la plua progreso de la Internacia Lingvo,

opiniante, ke la lingvaj obstakloj estas unu el la aspektoj de rasaj antaŭjuĝoj kaj ke la lingva diskriminacio estas unu el la ĉefaj formoj de kultura diskriminacio,

esprimas sian planan apogon al la planitaj agadoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por la Jardeko de Aktivado por Kontraŭbatali Rasan Diskriminacion,

bonvenigas la specialan laborplanon de Universala Esperanto-Asocio por la Jardeko,

aliĝas al ĝiaj instigoj al la registaroj aliĝi, ratifi kaj realigi la principojn de la Konvencio pri Elimino de Ĉiuj Formoj de Rasa Diskriminacio kaj aliaj konvencioj en la sfero de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, kaj *alvokas* ĉiujn Esperanto-organizaĵojn al mondskala kunlaboro por efika plenumo de tiu laborplano de UEA.

3.

La 59-a UK de Esperanto, pritraktante la ĉefan temon de la Kongreso, nome „Naciismo kaj Internacia Kunlaboro en la Nuntempa Mondo“, kaj ellaborante la agadplanon de Universala Esperanto-Asocio por la tuj venontaj jaroj,

konstatas, ke nur per unueca, celkonscia laboro la Asocio prosperos,

apelacias al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj kaj ĉiuj unuopaj membroj realigi la divesflankan agadon tuŝitan en la Tria Baza Laborplano de UEA, akceptita en Beograd, 1973,

kaj plue emfazas, ke la principo de aktiva neŭtraleco, tia, kia ĝi estis praktikata en la laboro de UEA en la lastaj jaroj, estas la sola ebla vojo por la prosperigo de la Asocio, grava unuiga forto por ĝia laboro, kaj plej bona kondiĉo por efika kaj harmonia internacia kunlaboro en la kadro de la Asocio.

Respondoj al la demandoj

„Ĉu vi scias?“

(n-ro 5 de „BE“)

aeroplano
armaturo
balkono

baroko
betono
bizono

Pardonpeto

„Novaj proverboj“ en n-ro 6 de „Bulgara Esperantisto“ estas de s-ano Roman Grinŝpan — Taŝkento, USSR. Ni petas pardonon, ke ni ellasis la nomon de la aŭtoro!

Redakta Komitato: Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BÂCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI.


Administra sekretario: Minko CONKOVSKI

Teknika aranĝanto: Prodan PRODANOV

Korektis: Minko Conkovski

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29



STEL-ENIGMO

I-II. Monato de la kalendaro, nomita al la romia dio de la tempo, kiun oni prezentas kun du vizaĝoj.

I-V. Parto de virina vestaĵo.

II-III. Vespera aŭ dumnokta muziko sub la fenestroj de amata persono (radiko);

II-I. Tia estas la tago, kiam brilas la suno.

III-IV. Eminentia aparta spiritkapablo.

III-II. Ceremonia vira vesto de la antikvaj romianoj.

IV-V. Scienco studanta la rimedojn por konservi la sanon.

IV-III. Plej ŝatata eksterofica okupo de iu persono (rad ko).

V-I. Plej supera oficiale konstatita supereco de konkursanto en sporto.

V-IV. Arbetu kun belaj floroj el kiuj oni produktas bonodoran oleon.

Post korekta solvo de la stelenigmo, eliru la literojn el la numeritaj ĉeloj laŭ jena ordo: 14, 12, 6, 3, 4, 8, 7, 1, 12, 10, 7, 11, 10, 11, 10, 9, 1, 12, 4, 13, 11, 15, 2, 9, 6, 8, 10, 2, 15, 9, 5, 1, 12, 6, 10. Vi ricevos aktualan frazon.

Marin Băcevi

KARAJ LEGANTOJ,

Komenciĝis la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ por 1975. Ni ege petas vin: faru ĉion eblan por kolekti maksimuman kvanton da abonoj. Malgraŭ la malfruigoj de apartaj numeroj, kaŭze de malfacilaĵoj en la presejo, neniuj bulgara esperantisto devas resti sen la asocia organo. „Bulgara Esperantisto“ estas grava instrumento en la nobla laboro por disvastigo de nia lingvo, por eduko kaj mem-eduko, por plialtigo de la propra Esperanto-kulturo kaj lingva nivelo.

La Redakcio starigas honoran VERDAN TABULON. Sur ĝi aperos la

nomoj de tiuj aktivuloj, kiuj kolektos almenaŭ 40 abonojn, kaj la portretoj de tiuj, kiuj kolektos 60 abonojn. Samideanoj, kiuj varbos pli ol 80 abonantojn, ricevos krome specialan verdan flagecon kaj E-librojn.

Sur la VERDA TABULO aperos ankaŭ la nomoj de tiuj distriktaj E-komitatoj kaj E-societoj, kiuj plej bone kaj rezulte organizos la abonkampanjon.

DO, AL STREĈA LABORO, KARAJ GEAMIKOJ! NI NEPRE HAVU 5000 ABONANTOJN!